# Poŝtkestoj en la mondo



# Japanio

## Aŝio, Toĉigi




Malnova tubforma poŝtkesto kune kun telefonbudo (jam rara) en Aŝio, kiu estas velkanta eksa kuprominejа urbeto. Oni ne bezonas anstataŭigi ĝin per la novstila.

# Hiroŝimo




En 1952 tiu ĉi poŝtkesto estis fondita memore al la 4-a Kongreso de Poŝtamantoj okazinta en Hiroŝima. Devizo "Poŝto ligas la mondon" estis gravurita.

# Uĵi, Kioto




En 2001 tiu ĉi poŝtkesto estis starigita memore al la 50-a datreveno de la fondo de la urbo Uĵi, Kioto. La urbo estas fama pro teo, tial la kesto havas la formon de tekonservujo.

# Varmfontejo Ginzan, Jamagata







Malnovaetapa urbeto
Narai, Nagano

# Novaj poŝtkestoj






## Kial la japanaj poŝtkestoj estas ruĝaj?

Por koncize diri, la kialo, kial japanaj poŝtkestoj estas ruĝaj, estas por malhelpi homojn hazarde urini turniĝante al ili.

Dum 30 jaroj, de 1871 ĝis 1901, poŝtkestoj en Japanio estis nigre pentritaj. Stratlanternoj ankoraŭ ne estis vaste uzataj tiutempe, kaj iuj homoj plendis, ke nigraj poŝtkestoj estis malfacile videblaj nokte, sed poŝtkestoj restis nigraj dum 30 jaroj.

Fine de la 19-a jarcento, samtempe kiam poŝtkestoj fariĝis pli oftaj, publikaj necesejoj ankaŭ komencis esti instalitaj tutlande. Ĉar publikaj necesejoj fariĝis pli oftaj, okazis oftaj okazaĵoj, kie preterpasantoj mislegis la vorton "poŝtkesto" (yubinbako 郵便箱) skribitan sur nigraj poŝtkestoj kiel "tarebinbako" (垂便箱) kaj urinis en ili. Ĉi tiu okazaĵo kondukis al tio, ke poŝtkestoj fariĝis la ruĝaj, kiaj ili estas hodiaŭ.

# Hungario

Foje ne estas simple trovi poŝkeston en Budapeŝto, la tradicia korespondado komencas eksmodiĝi, sed apud poŝtoficejoj tamen..., sed videblas sur la aldonita foto, kiel neglektita kaj malzorgita ĝi estas. Amike: Anna



# Ĉeĥio

Tuj aperis en mia e-kesto bildo de nia malnova bela blua poŝtkesto kaj ni rememoris belan poemon de nia klasikulo:

Blua poŝtkesto sur angulo de nia strato ne estas ordinara aĵ´.
Homoj enmetas en ĝin leteretojn, en unu flankon gajan, en la duan mal´.

Jindřiška Drahotová



Antau du jaroj la ŝtato provis altrudi al ĉiuj nur elektronikajn poŝtservojn. Sed multaj maljunuloj uzas nek poŝtelefonojn, nek komputilojn. Ĉiujare kosto de poŝtaj servoj plialtiĝas, sed interreto kostas multe pli.

Ankoraŭ al domoj venas poŝtistinoj. Ĉe malgranaj vilaĝoj ofte en sama loko estis distrikta oficejo, apoteko, kaj malgranda poŝto, sed ili estis likviditaj malgraŭ protestoj de lokaj loĝantoj.






Via ideo dokumenti surstratajn poŝtkestoj estas ne nur interesa, sed grava. Tuj mi vizitis poŝtkeston, proksime de mia hejmo por foti. Mi ĝin jam plilongan tempon ne uzis. Kaj kion mi vidis: Nu, poŝtkeston mi ne vidis.



La oranĝkolora poŝtkesto mankis, restis nur soklo. La blua kesto jam dekoj da jaroj ne estas uzata. Poŝtoficejo la bluajn kestojn vendis kun servo de abono kaj livero de ĵurnaloj kaj gazetoj.



BMi serĉis plu funkciantan poŝtkeston. Ĉe supermarketo (kiujn negocas Germanio) Kaufland mi trovis tiun ĉi funkciantan poŝtkeston, starantan iom ebrie.

La telefonaj surstrataj kameretoj malaperis jam antaŭe. Mi bedaŭras, ke mi ne fotis ilin.

Sed alia problemo estas pli grava. Oni ne povas aĉeti poŝtmarkojn en lokoj kiel antaŭe, nur en poŝtoficejo. En urbo ekzistis tiuj 4. Du el ili oni ĉi jare fermis. La pagoj plialtiĝis. Je simpla poŝtkarto oni pagas 31 ĉeĥajn kronojn (1 kg da pomoj aŭ 1 kg de rizo). Jindřiška Drahotová

# Rusio




Vi pravas, poŝtejoj malaperos baldaŭ, mi timas. Ankaŭ ĉi tie ilia nombro malpliiĝis. Ni uzas poŝtejon, ĉar mi amas sendi Kristnaskajn kartojn al miaj amikoj eksterlande. Nia poŝtejo estas proksime, ĉirkaŭ dek kvin-minuta promenado. Lidija.



# Italio




En Milano, Italio. El la tri poŝtkestoj funkcias nur unu. La aliaj estas fermitaj per glubendoj. Dirk




Japanino vojaĝanta en Italio fotis tiun ĉi poŝtkeston en la urbo PERUGIA en aŭgusto 2025.

# Monako

Hodiaŭ mi promenis en Monako. La princlando, per tajno, situas je 1 horo el mia hejmo en Nico. Yanpetro

# Nederlando



**Tiu ĉi poŝtkesto troviĝas en Ambochtenloon, Bredo.**

**Herman Pijpers**

# Germanio





jen tri diversaj poŝtkestoj el mia urbo:

1000082948 duona = malnova poŝtkesto

1000082960 duona = nova poŝtkesto




1000082941duona = moderna poŝtstacio kun poŝtkesto

Ronaldo

Du fotoj de poŝtkestoj en Germanio:




- historia, sed ankoraŭ funkcianta blua poŝtkesto en Potsdam (apud Berlino, ĉirkaŭ 1890)




- moderna flava poŝtkesto en Leipzig kun algluaĵoj kaj manskriba admono "nur amleterojn"

# Francio




Ĉi kune vi trovos fotojn pri du poŝtkestoj en mia kvartalo, en Nico (Francio).
La malgranda lokiĝas apud mia hejmo.

Yanpetro




Ĉi kune vi trovos fotojn pri du poŝtkestoj en mia kvartalo, en Nico (Francio).
La granda situas ĉe la superbazaro, kie ĉiu semajne mi faras miajn aĉetojn.

Yanpetro




Leterkestoj en mi vilaĝeto Moret sur Loing (Francio).

Rajmundino



Leterkestoj en mia vilaĝeto Moret sur Loing (Francio).

Rajmundino




Jen nova poŝtkesto fotita en Aix-en-Provence (Francio)




Jen poŝtkesto fotita en vilaĝo en la francaj Alpoj.




Jen foto de la poŝtkesto ĉe la naturista kampadejo.

Telemo




En mia vilaĝo de Levens-o (ĉ 5000 enloĝantoj) la poŝtoficejo estas malfermita nur du kaj duono tagojn ĉiusemajne, kaj estas 6 poŝtkestoj dise sur la komunumo.

Jen unu el ili kun tipe flava koloro.

Kelkaj komercejoj ankaŭ rolas kiel poŝtoficejo por leteroj kaj pakaĵoj.

Urso

**La kialo de la flava koloro por la poshtkestoj:**

La familio Thurn und Taxi estas princa germana familio (unue el Lombardo, nord-Italio ) ege riĉa. Ekde la 13a jarcento ĝi organizis la poŝtan servon en Lombardio, poste tra la tuta mezeŭropo dum jarcentoj. La flava koloro estas marko de ĝia blazono.

La Sankta Germana Imperio ĝis 1806 regis la teritorion de meza Eŭropo dum ĉirkaŭ dek jarcentoj ; ĝi kunligis multe da sendependaj regnoj.






Mi sendas foton de poshkesto de mia kvartalo en Nantes.

Martine Rivière


POSTES
LA LEVÉE
DE
EST FAITE

# Ĉinio




En la epoko de la Qing-dinastio




La 20-jarcento

Bedaŭrinde, nuntempe en multaj urboj de Ĉinio jam malvideblas poŝtkesto pro la nova telekomunika tekniko. Mi ne scias, ĉu troviĝas ili en malproksimaj lokoj ekzemple en suburbo kaj kampara vilaĝo.  YU Jianchao

Antaŭ la malapero



# Meksiko







**Jen! Jxoakino vega**

# Brazilo




De kelkaj jaroj mi ne sendis leterojn, eble pli ol kvin jaroj.

La poŝtmarko temas pri poŝtkesto, tamen, neniam mi vidis poŝtkeston, kiu aspektas, kiel tiu sur la poŝtmarko.

Mi aldonas foton de poŝtkesto, kiun mi prenis el la interreto, por ke vi vidu, kiel aspektis la lasta, kiu mi vidis. Kelli



# Finnlando




El miaj kolektitaj poŝtmarkoj mi trovis tiun ĉi poŝtmarkon.

# Anglio


Fakte estas kuriozaĵo pri anglaj poŝtkestoj: ili ĉiuj havas la simbolon de la reganta reĝo aŭ reĝino, komencante de la reĝino Victoria en la 19a jarcento, kiam oni komencis instali poŝtkestojn.

Mi trovis poŝtkestojn de ĉiuj gereĝoj de Viktoria ĝis Elizabeto en mia kvartalo kaj la du najbaraj kvartaloj. Londono kreskis tre rapide fine de la 19a jarcento kaj komence de la 20a, kaj la plej malnovaj poŝtkestoj montras, kiam la kvartalo estis konstruita. Jen ili:


Oni vidas la simbolojn pli klare en ĉi tiu artikolo: https://www.postalmuseum.org/blog/royal-cyphers-on-letterboxes/

Laŭ tiu artikolo, skotaj poŝtkestoj de la reĝino Elizabeto havas malsaman simbolon. Tial mia mesaĝo temas pri anglaj poŝtkestoj, ne nepre britaj.

Anna Lowenstein


1837-1901
1837-1901
1901-1910
1910-1936
1936
1936-1952
1952-2022
2023-Present
1952-Present





Vic = Victoria Regina (reĝino en la latina). Regis 1837-1901





Ed VII = Edward VII Rex (reĝo en la latina), Edvardo la 7a. Regis 1901-1910.




# GR

Geo V = George V, Georgo

la 5a. Regis 1910-1936.






Geo VI = George VI, Georgo la 6a. Regis 1936-1952.




ER = Elizabeth II, Elizabeto la 2a. Regis 1952-2022.

# Kanado





Tiun uzas la poŝtoficejo por kolekti kaj homoj por sendi poŝton; ĉi tiu estas proksime al la hejmoj:

# Belgio




La unua estas en magazeno (ne poŝtoficejo): por sendi la poŝtaĵojn.

La dua estas en granda parkejo por ricevi paketojn.



Mi serĉis poŝtkeston sed ni ne plu multe havas ilin. Do...

Ni ankoraŭ ne plu havas multe da poŝtoficejo. Do....




La unua poŝtkesto estas tre aĝa. Sed oni ankoraŭ vidas tiujn en Belgio sed nun estas pli malofta. Ili estis en la poŝtoficejoj aux sur la stratoj.




La dua estas uzata nun.

Viviane